# Invito

al 4-a landa Zamenhof-tago

Karaj amikoj,

la Stralsundaj esperantistoj invitas vin al la ĉijara landa Zamenhoftago kaj deziras amuzan kaj ripozplenan tagon je

## sabato, la 7an de decembro 2002.

La kunveno okazos en la gastejo **„Kurhaus Devin“** en la samnoma urboparto de nia urbo kaj komenciĝos je 9:30 h.
Vi atingos la lokon, alveninte trajne per la buslinio 3 (stacio apud la stacidomo) kaj devos uzi tiun ĝis la finstacio. Se vi ĝustatempe informos nin pri via preciza alventempo, ni ankaŭ akceptos vin en la stacidomo.

Per aŭtomobilo el oriento (Greifswald, Neubrandenburg, Szczecin ktp.) vi direktiĝu dekstren tuj je la unua granda stratkruciĝo post la enirŝildo de Stralsund! Tiam vi certe trovos la restoracion. El okcidento vi kompreneble devas veturi al la Greifswalda direkto kaj uzi la lastan kruciĝon maldekstren. Se vi havas bonan stratmapon, estas rekomenda jena vojo de Rostock: A20 ĝis la fino (Sanitz) – Tribsees – Franzburg – Abtshabgen – Elmen-horst/Zarrendorf – Stralsund. Tiam vi atingos la lokon Devin kiel „orientulo“sen traveturi Stralsund-on.

**Programo**

matenmanĝo post la alveno
kvizo por ĉiuj
videoprelego pri UK en Fortaleza
festprelego
muzikprelego pri la germanaj romantikaj komponistoj
tagmanĝo
promeno tra la naturprotektejo „Duoninsulo Devin“
kafoklaĉo

Prezo: Ni ne postulas apartan kontribuon, sed la konsumitajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn ĉiu kompreneble devas pagi. La gastejo „Kurhaus Devin“ ofertas gastĉambrojn. Kiu deziras tranokti kaj reveturi nur je dimanĉo, bonvolu mem prizorgi la koncernan tranoktejon (tel.: 03831 6676-3). La adreso estas: Kurhaus Devin, Dorfstr. 11, 18439 Stralsund-Devin.
Se vi havas demandojn, telefonu aŭ sendu retan mesaĝon al 03831490003 aŭ

Gun.Eb@t-online.de !

Ni ĝojus, se vi abunde partoprenus,

*via Antaŭpomeria E-grupo Stralsund*